

Dudekkvina jariĝo de Unesko
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 433 1972.01.26 & 29

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Pasintan jaron kaj tiun ĉi jaron multaj mondorganizaĵoj fariĝis kaj fariĝos dudekkvin-jaraĝaj. Okaze de la celebrado de la dudekkvinjariĝo de Unesko la gazeto *Hungara Fervojista Mondo* publikigis artikolon de doktoro Ivo Lapenna, kies erojn ni legos al vi hodiaŭ.

A.- « Nun Unesko konsistas el 125 ŝtatoj-membroj. Sesdeko de ili eĉ ne ekzistis kiel sendependaj ŝtatoj en la tempo de la fondiĝo [en 1946].

Cl.- *Laŭ la Konstitucia Akto « la celo de la Organizaĵo estas kontribui al paco kaj sekureco per antaŭenigo de kunlaborado inter la nacioj tra edukado, scienco kaj kulturo por progresigi universalan respekton al justeco, al la rego de juro kaj al la homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj, rekonitaj de la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj por ĉiuj popoloj de la mondo sen diferencigo pro raso, sekso, lingvo aŭ religio. » Tiun bazan celon la Organizaĵo atingas per tri grupoj da agadoj : helpo al disvastigo de scioj ; donado de vigla impulso al evoluigo de edukado kaj al disvastigo de kulturo ; laboro direktita al reciproka kompreniĝo inter la nacioj.*

A.- Por plenumi siajn taskojn Unesko disponas pri konsiderindaj financaj rimedoj. Ili kreskis de jaro al jaro. En 1946 la unua sesio de la Ĝenerala Konferenco akceptis buĝeton de 7 milionoj da dolaroj por la jaro 1947 ; en 1970 la 16-a sesio voĉdonis por buĝeto de preskaŭ 90 milionoj da dolaroj por la dujara periodo 1971-1972. Aldone al la buĝetaj sumoj, Unesko havas je sia dispoŝo ankaŭ diversajn specialajn fondaĵojn, destinitajn por la realigo de apartaj projektoj. Ekzemple : la tiel nomata Evoluiga Programo de Unuiĝintaj Nacioj komisiis al Unesko la prizorgon de 164 projektoj

Cl.- *(laŭ la stato de la 31-a de januaro 1971)*

A.- *por la sumo de preskaŭ 660 milionoj da dolaroj. Kvindek ok el tiuj projektoj rilatas al edukado kaj 106 havas sciencan aŭ teknologian karakteron ; 48 projektoj estis sukcese plenumitaj antaŭ la fino de 1970. [...]*

Cl.- *Unesko estas interŝtata organizaĵo, apartenanta al la tiel nomata « familio de Unuiĝintaj Nacioj ». Ĝia interna organizo sekvas la strukturon jam firme establitan por tiaspecaj interŝtataj organismoj. La ĉefa organo estas la Ĝenerala Konferenco, en kiu estas reprezentitaj ĉiuj ŝtatoj-membroj. Nuntempe ĝi kunvenas ĉiun duan jaron, difinas la labor-programon kaj akceptas la buĝeton. La decidan vorton en ĉiuj gravaj demandoj havas la Ĝenerala Konferenco, tio estas la suverenaj ŝtatoj-membroj. Ĝuste tial, por atingi la decidon de Unesko necesas aĝi samtempe kaj paralele ĉe la registaroj de la ŝtatoj-membroj kaj ĉe la Sekretariato. UEA laboris precize tiel ekde 1950 en ĉiuj ĉefaj klopodoj favore al la Internacia Lingvo. »*

A.- Post tiuj ĝeneralaj informoj doktoro Ivo Lapenna pli detale priskribas la rilatojn inter Universala Esperanto-Asocio kaj Unesko. Jen kelkaj el liaj informoj :

Cl.- « UEA atentigis en pluraj okazoj Uneskon pri nerimarkita aŭ neglektata formo de diskriminacio, nome pri la lingvo-diskriminacio, tio precipe okaze de la Jaro de Internacia Kunlaboro en 1965 kaj Jaro de la Homaj Rajtoj en 1968.

A.- En 1948 Unesko komencis realigi programon de tradukoj. La ĉefa manko de tiu ĉi projekto estas, ke per ĝi eĉ pliriĉiĝas la angla kaj franca literaturoj, jam apartenantaj al la plej riĉaj de la mondo, dum la malpli ampleksaj literaturoj apenaŭ havas ian utilon. Siatempe UEA atentigis pri tio la Sekretariaton de Unesko kaj samtempe lanĉis la serion **Oriento-Okcidento**, en kiu jam aperis 12 unuarangaj Esperanto-tradukoj de gravaj verkoj el diversaj literaturoj. [...]

Cl.- Unesko publikigas la faman **Index-translationum** (liston de la tradukoj). La Centro de Esploro kaj Dokumentado de UEA regule liveras dokumentojn pri la tradukoj en la Internacian Lingvon por tiu **Index-translationum**.

A.- Nuntempe en la mondo ekzistas ĉirkaŭ 3'000 internaciaj **neregistaraj** organizaĵoj. El ili nur 294 havas konsultajn rilatojn kun Unesko. Tiu tricento da organizaĵoj estas dividitaj je tri kategorioj. Al la kategorio A entute apartenas 32 organizaĵoj, el kiuj pluraj estas kreitaj de Unesko mem kaj havas iugrade registaran karakteron. En la kategorio B troviĝas 156 organizaĵoj, inter kiuj Universala Esperanto-Asocio ; la ceteraj organizaĵoj apartenas al la kategorio C.

Cl.- UEA estis akceptita kiel organizaĵo en konsultaj rilatoj kun Unesko jam en 1954, okaze de la sepa sesio de la Ĝenerala Konferenco en Montevideo.

A.- En 1959, okaze de la 100-jara datreveno de la naskiĝo de Zamenhof, la Plenuma Komitato de Unesko deklaris la iniciatinton de la Internacia Lingvo Esperanto, doktoron L.-L. Zamenhof, unu el la grandaj personecoj de la homaro kaj invitis ĉiujn registarojn celebri la eventon. Tio multe helpis la esperantistojn diskonigi Esperanton. »

Cl.- Doktoro Ivo Lapenna konkludas sian artikolon, dirante, ke « malgraŭ troa burokratiĝo, Unesko plenumas treege utilan rolon. » Lia ĉefa kritiko estas, ke « Unesko ne alfrontas la lingvan demandon en internaciaj rilatoj, kiel unu el la plej radikalaj obstakloj al efika realigado de la idealoj, kiuj inspiris ĝian fondiĝon kaj kiuj estas la senco mem de ĝia ekzisto. » Doktoro Ivo Lapenna fidus, ke venos la tempo, eble eĉ relative baldaŭ, kiam Unesko devos plej serioze okupiĝi pri tiu problemo.

A.- Vi aŭdis prelegon el Svislando.

Cl.- Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !